

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

(I. P. R.)

OFICIALA MONATA ORGANO DE

— Internacia Asocio de Instruistoj. (I. A. I.) —

JARA ABONO : Sm. 1.500 — Senpaga por la membroj de I. A. I.

Membra kotizaĵo por jaro	}	ordinara membro	1 Sm.
(La asocia jaro komencas la		membro - propagandulo	4 Sm.
ian de Aŭgusto)		membro - donaculo	10 Sm.

N. - B. — I. A. I. ankaŭ akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj helpas ĝian agadon.

Tarifo pri anoncoj.

Por unufoja enpresado :

1/1 paĝo	Sm. 16		1/8 paĝo	Sm. 3,200
1/2 paĝo	Sm. 10		1/16 paĝo	Sm. 2
1/4 paĝo	Sm. 6			

Malgrandaj anoncoj rekomercaj Sm. 0,200

Rabato por 3-foja enpresado 10 %

» » 6-foja » 20 %

» » 12-foja » 30 %

N. - B. — La membroj de I. A. I. pagas nur je duonprezo, krom la rabato, ĉiujn anoncojn.

Avizoj de la Redakcio. — Nepresitajn manuskriptojn ni resendas nur tiam, se oni aldonis poŝtpagon por resendo. — La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. — Represoj kaj tradukoj de niaj artikoloj estas permesataj, se ili ne estas speciale rezervitaj; sed oni ĉiam citu nian revuon kaj sendu al ni almenaŭ 2 ekzemplerojn de la tradukaĵo. — En la fakoj « Bibliografio » estos registrataj nur tiuj gazetoj aŭ libroj, en kiu ajn lingvo, de kiuj venis almenaŭ 2 ekzemplerojn. — La redakcio respondas letere aŭ poŝtkarte nur tiam, se oni aldonis por la respondo internacian respondkuponon aŭ respondkarton.

REDAKTORO - ADMINISTRANTO

Sro JAN JACOBS, kasisto de I. A. I.

BOOMSCHÉ STEENWEG 444, ANTWERPEN — BELGIJO.

— NORVEGA
ESPERANTISTO —

Dumonata oficiala organo
de Norvega Esperantista Ligo.
8 p., Esperante & Norvege.
Jara abono : 2,00 kr. (1.100 Sm)
Adm. :
Bergslengate, 11, Kristiania.

POŝTA ESPERANTISTO
Monata, oficiala organo de la
Internacia Ligo de
Esperantistaj Poŝtovicistoj
(Ildepo)
Jare : 1 Sm. Oni sin turnu al :
Arnold Behrendt
Maxstr., 22, Breslau. Germanujo

ŜVABA ESPERANTISTO
duonmonata gazeto redaktata
germane kaj esperante, 8 paĝa
en kvarobla monoformato ofic-
iala organo de la « Virtemberga
Esperanto-Ligo
Aperas ankaŭ kun iometeŝanĝata
enhavo kiel
BAVARA ESPERANTISTO
oficiala organo de la « Bavara
Esperanto-Ligo.
Sola gazeto por la memstudo en
germanaj landoj ! Bonega varb-
ilo ! Ĉiu propagandisto devas
posedi ĝin !
Eksteraordinare malalta prezo.
Nur Sm 0,900 jare (Rabato por
grupoj).
Eldonejo R. Abt, G. m. b. H..
Schussenried
Virtembergo (Germanujo).

— BRAZALA
ESPERANTISTO —

Monata oficiala organo de
Brazila Ligo Esperantista
8 p., Esperante & Portugale.
Jarabono : 5 fr. (2 Sm)
Adm. :
Avenida Rio Branco 155-2º
Rio de Janeiro. — Brazilujo.

SVISA ESPERO kaj
MONDA POŝTO

Duonmonataj oficialaj organoj
de la Svisa Esperanto Societo
alternante aperantaj, kun la mo-
nata aldono La Kolektanto por
ĉiuspecaj kolektantoj.
Helpa kaj Propaganda Organo
de la
*IXa Universala Kongreso de
Esperanto en Bern 1913*

LA MARTO

La tutaŭstria, ilustrita, monata
familia gazeto por la diversna
cia Aŭstrio.
Tute en Esperanto redaktata.
Abonprezo :
jare 5 H. - 2,200 Sm. —
ĉe « La Marto ». Hajda,
Bohemujo.

Avizo al la verkistoj kaj eldonistoj

Se vi vere deziras ke viaj verkoj kaj eldonaĵoj estu kiel eble plej multe vendataj, anoncu ilin en nia revuo. Viaj anoncoj estos legataj de niaj gemembroj, kiuj ĉiuj estas ne nur fervoraj esperantistoj, sed ankaŭ *instruantoj* de Esperanto. Al ili estas do komisiita konigi viajn verkojn kaj eldonaĵojn.

Gemembroj-verkistoj, profitu de la speciala rabato : neniu alie gazeto oferas al vi tiel profitigajn kondiĉojn !
Gekolegoj, varbu anoncantojn !

IAMAJ PEDAGOGIAJ PAĜOJ

La instruanto devas inciĝi la naturan aktivemon de la infanoj. Oni ne ĉesas krietadi al niaj oreloj, kvazaŭ oni verŝus en funelon ; kaj nia funkcio estas nur rediri, kion oni diris al ni ; mi volus, ke la instruisto korektu tiun parton kaj tuj ĉe la komenco, laŭ la komprenpovo de la animo, kies zorgadon li havas ; li unue montru al li la objektojn, celante, ke li gustumu la aferojn, ilin elektu kaj distingu de si mem ; kelkafoje jen al li malfermante, jen fermante la vojon. Mi ne volas, ke li eltrovu kaj parolu sola ; mi volas ke li aŭskultu sian disciplon parolante siavice... Estas bone, ke li trotigas lin antaŭ si por juĝi lian iradon kaj juĝi ĝis kia grado li devas malaltigi sin por konformiĝi je lia forto. Sen tiu proporcio, ni difektas ĉion ; kaj scipovi elekti ĝin kaj kondukti en tio mezure estas unu el la plej malfacilegaj taskoj, kiujn mi konas, kaj interkonsenti kun tiuj infanecaj iradmanieroj kaj ilin gvidi estas efekto de alta kaj tre forta animo. Mi marŝas pli certe kaj pli firme sur monto ol en valo. Ne estas mirindaĵo, se tiuj, kiuj, kiel nia kutimo postulas, entreprenas, per sama leciono kaj sama konduktmaniero regi plurajn spiritojn tiom malsamaj laŭ mezuroj kaj formoj, renkontas apenaŭ du aŭ tri, kiuj rikoltas taŭgajn fruktojn de lia disciplino. Li ne postulu de li nur raportojn pri la vortoj de sia leciono, sed pri la senco kaj la substanco, kaj ke li juĝu la profiton faritan ne per la atesto de lia memoro, sed de lia vivo. Kion li ĵus lernis, oni faru meti lin laŭ centformoj kaj adapti al tiom da diversaj temoj, por vidi, ĉu tion bone forprenis kaj bone faris sian. Tio estas atesto de nekuireco kaj maldigesto, elgorĝigi la viandon, kion englutis. La stomako ne plenumis sian funkcion, kiam ĝi nur ŝanĝis la fasonon kaj la formon de tio, kion oni liveris al ĝi por kuiri. Nia animo moviĝas nur fidante la parolon, ligita kaj trudita per l'apetito de la aliulaj fantazioj, servutita kaj sklavigita sub la aŭtorito de ilia leciono. Tiom oni subpremis nur per la ŝnuroj, ke ni ne posedas plu liberajn irmanierojn ; nia vigleco kaj libereco estas estingitaj.

La profito de nia studo estas, per ĝi esti fariĝinta pli bona kaj pli prudenta. La intelekto estas, diris Epiharmo, kio vidas kaj kio aŭdas : la intelekto estas, kio profitigas el ĉio, kio disponas ĉion, kio agas, kio superas kaj regas ; ĉiuj aliaĵoj estas blindaj, surdaj kaj kaj senanimaj. Certe ni igas ĝin servema kaj timulaĉa, lasante al ĝi nenian liberon fari ion el si. Kiu iam demandis sian disciplon, kion li openias pri la retoriko kaj la gramatiko, pri tiu aŭ tiu ĉi sentenco de Cicero ? Oni engluas ilin al ni en la memoron tute garnitaj, kiel orakloj en kiuj la literoj kaj la silaboj estas el la substanco de la afero. Scii parkere ne estas scii, tio estas konservi kion oni donis por gardi al sia memoro. Kion oni scias rekte, oni disponas tion, ne priatentante pri la modelo, ne turnante siajn okulojn al la libro. Malmolesteco nur librecas estas bedaŭrinda malmolesteco ! Mi dezirus, ke la Paluel el Pompée, tiuj belaj dancistoj lernigu kapriolojn lasante nin nur vidi ilin, sen ke ni moviĝas same kiel tiuj, kiuj volas instrui nian intelekton, ne skuante ĝin ; aŭ oni lernigu nin manovri ĉevalon aŭ ponardegon, aŭ la voĉon ne ekzercante nin, same kiel ĉi tiuj volas lernigi nin bone juĝi kaj lerte paroli, ne ekzercante nin paroli kaj juĝi

Montaigne (Essais, libro 1a, ĉap XXV).
Tradukis : PAUL BENOIT.

Esperanto-Unuiĝo de Danaj Instruistoj.

Nia unuiĝo nun komencis sian duan vivjaron, kaj malgraŭ kontratuloj kaj skeptikuloj ni kuraĝe laboras, esperante atingi nian celon : la enkonduko de Esperanto en la danaj lernejoj.

Ni ĝis nun precipe laboris pri forteco kaj bona organizo de nia unuiĝo, kaj tiu-relate ni en diversaj urboj, kie ni havas pli multajn membrojn, oficigis reprezentantojn elektitajn de la membroj mem. Ĉi-tiuj reprezentantoj estas ligilo inter la estraro kaj la membroj, ili ĉiam estos pretaj doni klarigojn pri Esp., se iu serĉus tiajn, kaj se ili mem

ne povas kontentigi la demandantojn, ili devas fari tion pere de la estraro.

Se aperos en la tagaj gazetoj artikoloj por aŭ kontraŭ Esp. la reprezentanto devas sendi eltondaĵon al la prezidanto. Cetere li enkasigas la kotizaĵojn kaj ensendos ilin al la kasisto, kaj li ĉiam dissendos propagandilojn de la unuiĝo.

La estraro petas al la reprezentantoj, ke ili unu aŭ du fojojn ĉiujare alvoku la membrojn al kunveno por ke ili kune pritraktu la aferojn de sia rondo, kaj la plej bonan propagand-manieron.

Ĉar nia unuiĝo havas tre fervorajn kaj fidelajn membrojn, ni fidas, ke nia laboro dum la estonta jaro bone sukcesos.

Esp. Unuiĝo de Danaj Instruistoj estus dankema, se niaj eksterlandaj kolegoj publikigas siajn spertojn pri la esperanta laboro, ni ĉiam tre volonte faros al ili rekompencon.

Kopenhago, 1913.

ASTA MIKKELSEN

prez. de : Esperanto-Unuiĝo de Danaj Instruistoj.

Nova Metodo por la Skribinstruado

Kun la komenco de la instruado de la latina skribo ekaperis por la germanaj gelernantoj duobla malfacilaĵo al kies lernado estas ligitaj veraj maloportunaĵoj. La infano, kiu ĝis nun nur kutimiĝis skribi la akrajn dikajn liniojn de la angula skribo, estas lernonta ilin skribi rondforme. La fundamenta malsameco de ambaŭ skribmanieroj efektive plimalfaciligas la unuan instruadon pri la latina skribo ; antaŭ ĉio tiu duobla malfacilaĵo de la skribo malhelpas la akiron de firmaj kaj precizaj skribostrekoj. La infano akiris dum la unuaj lernjaroj ankoraŭ neniun tre grandan lertecon skribadan kaj jam ĝi devas eklerni kun la komenco de la instruado pri latina skribo novajn skribostrekojn, kiuj malsimilas, rilate al la mana

faro, de tiuj antaŭe akiritaj. Oni ĝenerale spertas ke la ĝelernantoj facile faradas la eraron, miksante en siaj skribaĵoj nevole la akran kaj la latinan skribojn, kaj de la plej bonaj ĝelernantoj ambaŭ skribmanieroj estas mikse skribataj ĝis en la superaj klasoj.

Por alproprigi nun de la komenco al la ĝelernantoj la verajn fundamentajn formojn de la latina skribo per deviga intuitivo, por alĉutimigi ilin al la plej akurata faro ankaŭ de la manskribo kaj por tiamaniere akiri pli facile kaj pli certe ĝuste faritan kaj kursivan latinan skribon, Friedrich Sœennecken el Bonu (Germanujo), kiu estas unu el la pioniroj en aferoj pri skribado, eldonis preparajn kajerojn por latina skribo, pri kiuj ni deziras tie ĉi tute speciale altiri la atenton.

La preparaj kajeroj pri latina manskribo konsistas el 3 kajeroj sub la opa nomo, kolekto B. por distingi ilin de la 5 kajeroj de la kolekto A, kiuj estas destinitaj por la lernejoj, kie la instruado pri latina skribo jam komencas je la unua lernjaro.

En tiuj preparaj kajeroj pri latina skribo unue estas ekzercataj tiuj grandaj literoj kiuj nur konsistas el rektaj strekoj; poste tiuj grandaj literoj, kiuj povas esti farataj per rekta streko kaj kvaron- aŭ duoncirklo. Post tio sekvas la ekzercado pri la malgrandaj literoj dum konstanta komparo kun la respondantaj grandaj literoj kaj la allernado de la ciferoj.

Post kiam la rekta presoskribo estas lernita, komencas la ekzercado pri la oblikva presoskribo kaj poste kiel skriba reprezento de la oblikva presoskribo, la ekzercado pri la latina manskribo.

Ĉe tiu ĉi metodo instrumaniero la ĝelernantoj rekonas, de la unuaj rektaj linioj ĝis la kurantaj strekoj de la manskribo, la simplan, klare videblan kunrilato de la manskribo kun la presoskribo kaj tiel ricevas neforgeseblajn reprezentojn kaj konojn pri la fundamentaj formoj de la latina skribo.

Per la karakterizaj kaj treege celtrafe ordigitaj modeloj, kiujn enhavas la preparaj kajeroj, senpripensa

kopiado estas evitata kaj la laboro de la skribanta lernanto spirite pliprofundigita.

La skribekzercoj estas skribataj per malpeza plumingo kun skribdesegna plumo de Sœennecken, kiu *sen premo* skribas laŭ ĉia direkto same dikan skribon, tiamaniere ke la presitaj modelskribaĵoj per samaj strekdikaĵoj tute facile povas esti laŭskribataj.

La preparaj kajeroj de Sœennecken estas kunmetitaj laŭ la samaj principoj kiel liaj en la tuta mondo konataj kajeroj por ronda skribo. La eksterordinara sukceso de Sœennecken per lia metode de ronda skribo dependis de tio, ke li reduktis la tutan alfabeton de ronda skribo nur al malmultaj elementoj : al rekta linio kaj duoncirklo. Ĉar nun Sœennecken la saman principon estas aplikinta ankaŭ por la instruado de la latina skribo, la lernejo povas senŝancele sekvi lin, kaj jam aplikitaj, praktikaj instruprovoj konstatis ke Sœennecken per tiu metoda principo denove montris al la skribinstruado novan pioniran vojon.

El la germana lingvo tradukis
J. JACOBS
Antwerpen.

MINETO.

Mineto, tuj kiam la tago lumetas,
Vi sur la lanugan kusenon vin metas.
Vi estas tre mallaborema, mineto ?

Hieraŭ, tagmanĝo al ni vin altiris.
Kusita sur seĝo langeton vi tiris.
Vi estas frandema manĝema mineto !

Maneton de la mastrineto vi konas
Kiu vin glatigas, tiam vi ronronas
Vi amas karesojn, flatema mineto !

Sed mia sturneto, bedaŭre ĵus falas
Antaŭ vin, perfidan, kiel vi regalas
Vin baldaŭ avide, kruela mineto !

(Laŭ Clovis Hugues)
PAUL BENOIT.

Humoraĵo

Ian tagon, S-ro X..., instruisto en vilaĝeto perdita meze de montaro, foriris el sia hejmo kaj sin direktis al la proksima rivereto. Li portis hokfadenon, ĉar nia kolego estas pasia fiŝkaptisto.

Do, li marŝis malrapide sur la vojo borderante la riveron, serĉante taŭgan loketon por kapti trutojn kaj gobiojn.... La bela vetero gajigis lin kaj, kvankam estis la horo eniri la klasĉambron, li daurigis sian promenadon. — « Mi eniros la klasĉambron, li diris al si, kiam fritajon mi estos kaptinta. »

Subite, biciklisto trapasinte kurbiĝon de l' vojo, aperis antaŭ li. Scivoleme la instruisto rigardis alproksimiĝi tiun vojaĝanton ĉar tre malofte oni vidis vizitantojn en tiuj lokoj ; deŝ pli malofte, pro la malfacilaĵoj de l' vojo, oni vidis biciklistojn.

La biciklisto, renkontante S-ron X..., haltis kaj demandis lin :

— « Pardonu S-ro, mi iras al S-ta P.... Ĉu tiu vilaĝo kuŝas malproksime de tie-ĉi ?

— Ne, S-ro, ĝi kuŝas nur je du kilometroj.

— Dankon, S-ro, kaj la nekonatulo daŭrigis sian vojon, sponĝante sian frunton de kiu ŝviteroj falis.

— Tiu ŝvitanta homo estas turisto, ekpensis la instruisto kaj li ankaŭ daŭrigis sian iradon.

Post unu horo, fiŝkaptinte sian promesitan fritajon, li iris returnen al la lernejo. Li marŝis malrapide, pensante pri la fiŝoj kiujn li manĝos je la dekdua. Kiam li eniris la lernejan korton li vidis denove kun surprizo la... turiston, kiu meze de la infanoj ekzamenis atente la lernejon.

...Mi pensas ke miajn estimatajn gekolegojn vizitas de tempo al tempo lernejoj inspektoroj. Sed mi memoras ke la vilaĝo S-ta P... pri kiu mi parolas, kuŝas kiel nesto de aglo sur altaj montoj kaj ke tien oni alvenas nur laŭ maloportuna vojo. Neniam ia inspektoro kuraĝis surgrimpiti tiujn montojn. Tial la instruisto de St P., por tiel diri, posedis nenian ĉefon. Neniam li estis vidinta « inspektoran kapon » en sia klasĉambro. Li tute ne konis la novan unugradan inspektoron, viron junankaj viglan, kiu tiumomente estis antaŭ li. Tamen li tuj ekkomprenis, iris al la... inspektoro kaj salutis iom embarasata. La vizitanto siaflanke salutis ridetante :

— Bonan tagon, S-ro instruisto, (li ne povis erari). Ĉu vi estas farinta bonan fiŝkaptadon ?

— Sendube... jes, S-ro inspektoro (li ne plu povis erari) sed...

— Ŝajnas al mi ke vi ne atendis mian viziton ?

— Por diri al vi la veron, S-ro inspektora Moŝto, mi tute ne atendis vin.

— Ŝajnas al mi ankaŭ ke viaj vilaĝhorloĝoj iom malfruiĝas, diris la inspektoro, ĉirante sian poŝhorloĝon

— Mi petas pardonon, S-ro inspektoro, kaj la instruisto balbutis malprecizajn klarigojn.

La inspektoro estis bonhumora, ne tro severa homo. Li nur komprenigis la instruiston ke oni ne eniras la klasĉambron du horojn post la regula momentó. Post tiu moralaleciono oni fine eniris la klasĉambron. Sed baldaŭ je la foriro de la lernantoj la inspektoro okupiĝis pri la tagmanĝo kaj li demandis al la vilaĝa instruisto :

— Ĉu oni povas tagmanĝi en ia hotelo tie-ĉi ?

— Ho ve ! S-ro inspektoro, nia vilaĝo posedas nek hotelon nek publikan horloĝon. Ĝi estas tre malriĉa kiel vi vidas. La plej proksiman hotelon vi trovos je dek kilometroj de tie-ĉi ?

La inspektora frunto sulkiĝis. Kial li estis alveninta en malgasteman vilaĝon, malproksime de ĉiuj loĝataj lokoj. Sed la instruisto siavice ridetante aldonis : — « S-ro Inspektoro, ĉar vi ne povas tagmanĝi tie-ĉi en hotelo, mi

gastigos vin, se vi ĝin permesas. Mi jam aŭdas mian fritajon bruigantan en la pato. Mia edzino estas bona kuiristino. Mi tutkore proponas ke vi tagmanĝu kun mi.

Ĉu la inspektoro ŝatis la trutojn? Ĉu li malsatis? Sendube jes, ĉar li akceptis la proponon al li faritan.

Kaj oni raportis al mi ke dum la tagmanĝo, S-ro inspektoro gratulis sinjorinon X... per tiuj vortoj: « S-ino, la poŝhorloĝo de via edzo estas iom neperfekta sed mi pensas la malon pri lia fritajo kaj lia edzino.

ANDRÉ ROUVERET.

instruisto en Bagard (Gard-France)

Projekto de Internacia Organizado

Dum la lasta ĝenerala kunveno de la franca asocio «Esperanto ĉe la lernejo» la jena projekto estis prezentita:

I. A. I. estas federacio de naciaj asocioj de geprofesoroj kaj geinstruistoj.

Celo. — Tiu federacio celas:

1^e Centralizi kaj konigi ĉiujn sciigojn rilatajn al la esperanta movado ĉe la lernejoj.

2^e Plifaciligi la rilatojn inter la geinstruistoj kaj ankaŭ inter la gelernantoj tutmondaj.

3^e Kunagadi por enkonduki esperanton en la profesiaj internaciaj kongresoj kaj en nia internacia oficejo.

4^e Alcentrigi kaj diskonigi la ĉefajn okazintaĵojn pri profesiaj interesoj.

5^e Diskonigi la lernejan organizadon en ĉiu lando.

6^e Diskuti pri pedagogiaj temoj.

Oficiala organo. — La oficiala organo estas I. P. R. kies ĉefredaktoro estas samtempe kasisto kaj ĝenerala sekretario de la Federacio.

Kunmeto. — Naciaj asocioj estas asocioj kies membroj apartenas al komuna lerneja organizado memstara.

Ĉiu el tiaj asocioj elektas ĉiujare rajtigitan reprezentanton.

Tiu oficiala reprezentanto publikigas en I. P. R. ĉiujn sciigojn utilajn pri sia asocio; ĉiujare, antaŭ la ĝenerala

kunveno, li devas sendi al I. P. R. ĝeneralan raporton.

Li reprezentas oficiale sian asocion ĉe la ĝenerala kunveno, kaj klopodas por ricevi abonprezojn al I. A. I. en sia lando.

Fara ĝenerala kunveno. — Ĝi okazas dum la internaciaj esperantaj kongresoj. Ĉiuj anoj de ĉiuj naciaj asocioj povas ĉeesti la ĝeneralan kunvenon, diskuti kaj fari proponojn sed nur la oficialaj reprezentantoj rajtas voĉdoni kaj alpreni decidojn.

Izolitaj membroj. — Izolitaj membroj de I. A. I. en la landoj kie ne ekzistas ankoraŭ nia societo devas elekti unu oficialan reprezentanton.

Ni insiste petas niajn gekolegojn por ke ili ekzameni tiun projekton dum la nuna jaro.

J. AIZIÈRE.

Alfortville apud Parizo.

Al la membroj de I. A. I.

Estimata Koleg(in)o,

Ĉar kelkaj cirkonstancoj devigis min prokrasti la aperon de n^o 10, 11 kaj 12 de la nuna jarkolekto de Int. Red.Revuo, mi deziras tion klarigi al vi. En la numero 8-9 Marto-Aprilo 1913, mi publikigis parton de tre interesa artikolo « Nova fako de la instruado » verkita de S-ro Havelka el Tiflis. Por la ceteraj partoj, kiuj estas ilustritaj per skribmodeloj mi bezonas kliŝaĵojn, kiujn mi ĝis nun ne ankoraŭ ricevis, sed kiujn mi atendas tuj post la kongreso en Bern. Dua kaŭzo de prokrasto estas la jena. Ĉar la monrimedoj de nia asocio preskaŭ estis elĉerpitaj en la monato de majo, mi klopodis varbi anoncantojn kaj mi sukcesis havi unu. Grava skribilarfabrikisto pagos la nececan sumon por eldoni duoblan kajeron. Sed ankaŭ por lia anonco mi bezonas kliŝaĵojn, kiujn mi ankoraŭ ne ricevis kaj kiujn mi ankaŭ atendas tuj post la kongreso. Do, kara koleg(in)o, ne malfidu nian aferon pro tio ; mi certigas vin ke mia nura klopodo estas kontentigi vin.

Esperante ke vi bonvolas senkulpigi min pri la nevola prokrasto kaj daŭrigos vian gravan helpon, mi sendas al vi miajn fratajn salutojn.

J. JACOBS

Red. Adm. de Int. Ped. Revuo

N.-B. — Bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ vian kotizaĵon por la aro 1913-1914, ne forgesante la monoferadon laŭvolan.

BIBLIOGRAFIO

Telekaba (83.332.000). — Zahlenlaute für die Ziffernschrift von Professor C. v. Pirquet. — Eldonis R. v. Waldheim, Jos. Eberle & Co, Wien, VII/1, Andreasgasse 17, Aŭstrio-Prezo 0.50 mk.

Tre originala provo por anstataŭi la maloportunan nomadon de la nombroj per sistemo de sonoj.

Universala Unuiĝo, organo por humana unuiĝo en tutaj formoj de la pensoj kaj agoj. — Eldono neperiodika, aperanta laŭ materialkoletado, redaktata en esperanto kaj angla aŭ rusa lingvo. — Eldonita : S-ro N. A. Ŝejerman, Lubotin, Ĥarkova gubernio (Ruslando) — Prezo : 0,600 Sm. (La sekvanta numero kostos 0,800 Sm.)

Tre interesa kaj riĉa enhavo !

Tacoma, belege ilustrita libro, angle redaktita kun esperanta aldono, enhavante la historion kaj priskribon de tiu prosperanta, usona urbo.

Ĝi estas oficiala eldono de Tacoma Commercial Club and Chamber of Commerce, Tacoma, (Washington) U. S. A. kaj senpage ricevebla laŭ la nomita adreso de ĉiu kiu intencas tie ekloĝiĝi.

Historio kaj teorio de Idó, verkita de S-ro Kotzin ĉefredaktoro de « La Ondo de Esperanto », kun antaŭparolo de R. Brandt, profesoro — lingvisto de Moskva Universitato. — Eldonis : Librejo « Esperanto », Lubjanskij projezd, 3, Moskvo, Ruslando. — Prezo : 50 kop. (0,530 Sm.)

La plej kompleta kaj dokumentita verko pri tiu temo kiu ĝis nun aperis. Ĉiu bona propagandisto devas ĝin posedi.

Superforta Ambicio, skizo el la esperantisto vivo, originale verkita de A. A. Saĥarov. — Eldonita de Librejo « Esperanto », 3, Lubjanskij projezd, Moskvo, Ruslando. — Prezo 20 kop. (0,220 Sm.)

La libro, skribita en tre flua lingvo, rakontas la historion de persono, kiu, fariĝinte Esperantisto, pro tro granda ambicio iĝas idisto kaj poste ne plu okupas sin pri internacia lingvo.

Statuto dell' Instituto Ligure d' Esperanto. (Regularo de la Liguria Instituto de Esperanto en Genova) aprobita dum la kunveno de la 24a de Novembro 1912.

Esperanto, lingua internazionale ausiliare neutra. Bonega propagandfolio, itale verkita.

Gvidfolio tra *Letchworth* (Ĝarden-urbo), eldonita de la Letchworth Grupo Esperantista sub la aŭspicioj de U. E. A. — Ricevebla de S-ro F. A. Goodliffe, « Elm Tree House, Letchworth, Anglujo.

Gvidfolio tra *Genevo*, eldonita de la Nova Esperanto-Klubo-Genevo. — Ricevebla de fraŭlino Mallet, sekretario, chemin de Beau Séjour, 14, Genevo, Svisujo.

Gvidlibro tra Graz. Bele ilustrita gvidlibro eldonita okaze de la IIIa Tutaŭstria Esperanto-Kongreso en Graz (Aŭstrio), de la « Stiria Esperantista Societo » en Graz, sub aŭspicioj de la « Provinca Ligo por fremdulaj aferoj en Stirio ». La gvidlibro estas ricevebla kontraŭ 0,200 Sm (2 respondkuponoj de la « Stiria Esperantista Societo » en Graz (Wielandgasse, 42) Aŭstrio.

Gvidfolio tra *Breslaŭ*, eldonita de « Loka Grupo Breslaŭ de Germana Esperanto-Asocio. Ricevebla de S-ro G. Mahn, Albrechtstr., 43, Breslaŭ, Germanujo.

Breslaŭ, vortpentraĵo de Hugo Kretschmer, el la germanlingva originala esperantigis Germana Esperanto-Asocio (Loka Grupo Breslaŭ). Tre oportua, multilustrita gvidlibro, ricevebla ĉe la ĉi supre nomita adreso. — Prezo ne montrita.



Didaktiko kaj Informatorio de J. A. Comenius

Al bona afero havas rajton ĉiuj nacioj.

Instruistaro de patrujo de J. A. Comenius komencis eldonadi *ĉiujn verkojn de Comenius* — «instruisto de instruistoj» en scienca, kritika eldono sub redakcio de diversnaciaj komeniologoj sub ĉefa redakcio de univ. prof. D-ro *J. Kvačala* en Jurjev (Dorpat-Rusujo). Ĝis nun eliris 4 volumoj kun 21 verkoj de Comenius, el kiuj la IV. volumo enhavas du glorajn verkojn de «instruisto de instruistoj»: *Didaktikon* boheman kaj grandan-latinan kun *Informatorio* de patrina lernejo en lingvoj: bohema, germana kaj latina, en kiuj Comenius mem *Informatorion* skribis. La IV. volumo estas do iel «internacia», kiel internacia estis la efikado de Comenius — «instruisto de nacioj», kiel ankaŭ oni lin nomas.

La granda, 640 paĝa volumo, redaktita de prof. D-ro J. V. Novak en Praha, havas krom ordinara scienca aparato — krom enkondukoj pri deveno, historio, enhavo, tradukoj kaj eldonoj de ambaŭ verkoj, krom registro kaj citataro, krom multaj rimarkoj kaj klarigoj sub streko, ankaŭ 6 belegajn faksimilojn de presadoj kaj manuskripto de Comenius. Per tio ĉion superas tiu ĉi eldono super ĉiuj ĝis nunaj eldonoj kie ajn eldonitaj; pro kio mi do rimarkas al ĝi instruistaron de ĉiuj lernejoj kaj gradoj, ĉiujn sciencajn kaj lerneajn bibliotekoj de ĉiuj nacioj Almenaŭ ĉiuj bibliotekoj de institutoj por instruistoj, bibliotekoj de ĉiuj universitatoj k. t. p. havigu tiujn ĉi du glorajn verkojn de Comenius, kiu tute ne estas antikviĝinta. Tion pravas elokvente ne sole la nuna *prusa* lernojordo, kiu en siaj ĝeneralaj ordonoj ripetas preskaŭ laŭvorte ĉapitron apatenantan al *Didaktikon*, sed ankaŭ *Orestano*, kiu konstatas similan influon sur *italan* lernejan leĝon el la j. 1904-5. — Kaj vere: en *Didaktiko* de Comenius estas — kiel montris *P. H. Hannus* — preskaŭ «in nuce» enhavitaj ĉiuj pedagogiaj opinioj de nia tempo, Comenius estis la *unua*, kiu postulis edukadon *por ĉiuj* — kaj ne nur por «mondo estonta», sed ankaŭ por tiu ĉi mondo; Comenius ne estis sole «la viro, kiu trovis novan vojon kiel instrui

lingvon latinan », kiel pri li diris *Hallam* ; Comenius faris multe pli. Per sia Didaktito — diras *H. Hofmeister* — donis Comenius fundamenton de ĉiu klereco en elementara lernejo, kiun li en Didaktiko organizis. Tiel fariĝis la Didaktiko de Comenius la programo de elementara lernejaro, kiu-laŭ *Ful. Beeger* — nur en la XIX jarcento estis efektivigata.

Didaktiko de Comenius, kiel diras prof. d-ro F. G. *Masaryk*, estas verko de homo tute praktika. Kaj ne sole Didaktiko, sed Pedagogio de Comenins ĝenerale, kiel pruvas tion precipe la aldono al Didaktiko — *Informatorio de patrinlernejo*, laŭ *Onick* « neordinare saĝa libreto, en kiu Comenius donis konsilojn, kiel edukadi infanojn ĝis la 6 jaroj ». Tiu ĉi libreto estas ĝis nun la plej bona kaj plej sincera verko pri edukado de la plej junaj infanoj — « la majstra verko de pedagogia literaturo » — kiel ĝin nomas *E. Denis*. Pri tiu ĉi libreto estis Comenius tiel kontenta, ke li tute ne volis ion ŝanĝi en ĝi, dezirante, ke ĝi estu tradukata en ĉiujnlingvojn naciajn. Tial li mem tradukis ĝin en lingvojn germanan, latinan kaj eble ankaŭ en lingvon polan, kaj oni devis en predikoj admoni gepatrojn, ke en ĉiu domo oni havu Informatorion kaj legu ĝin.

Per Informatorio stariĝis Comenins en vicon de tiuj, kiuj preparis hodiaŭan psikologion de infano (D-ro *Čada*) per Informatorio havas Comenius sian lokon ankaŭ en historio de pedopsikologio, diras *Dro Kädner*.

Adreso de administracio de tiu ĉi scienca eldonado de ĉiuj verkoj de Comenius estas : *Administracio de V. S. K. en Zlin, Moravio, Aŭstrio*, kie oni povas ricevi ankaŭ ceterajn ĝis nun eldonitajn 3 volumojn kaj ankaŭ 3 ĝisnunajn kajerojn de « *Arĥivo por esplorado pri vivo kaj verkoj de F. A. Comenius* » enhavantajn artikolojn en diversaj lingvoj : bohema, latina, slovako. sveda., kajero po 1 K. — Demandojn respondas esperante *Jos Krumpholc, instruisto en Bystrice-Hostyn, Moravio, Aŭstrio*.

N.-B. — Oni estas petataj traduki tiun ĉi referaton. Tradukintoj ricevos kolekton de poŝtkartoj kun portreto de Comenius el Rijks-muzeo en Amsterdamo.

JOS. KRÜMPHOLC

Pri la stato de Esperanto-movado inter la instruistaro en Saksujo.

(Daŭrigo. Vidu kajeron 4/5, paĝoj 25/26)

De post mia lasta raporto, kiu pritraktis la movadon ĝis Sept. 12, la afero en Saksujo senhalte progresis. La anaro de nia Esperanto-Asocio de la Saksa Instruistaro nun (monato junio '13) entenas 126 membrojn. Ĉiu dumonate aperas niaj presitaj « sciigaĵoj », nuntempe jam la numero 7a. Nia Asocio havis la 4an de januaro 1913 sian 4an ĉefkunvenon kaj la 5a okazos dum la aŭtunaj libertempoj (ĉirkaŭ la 1a de oktobro) okaze de la jara, ĉefkunveno de la Saksa Instruistaro en Chemnitz. La anoj de nia Asocio pli kaj pli kuraĝas enkonduki Esperanton en la popollernejojn. Eble mi en venonta daŭrigo de ĉi tiu artikolo povos publikigi pli detalan statistikon ol en I. P. R. no 3. Ankaŭ la malhelpo kontraŭ niaj celadoj inter la Saksa Instruistaro pli kaj pli malmultiĝas. Tion pravas kursoj por geïnstruistoj, kiuj tre multnombre estas vizitataj. Multe helpas nian aferon la registaro de Saksujo kiu tre subtenas la Saksan Esperantan Instituton. Ĝi donas al ĝi jaran monhelpon da 500 Sm. kaj permesis la fondon de Esperanto-lernejoj en Dresden, Leipzig, Plauen Chemnitz, Zwickau. Per helpo de la Esperanto-instituto ne nur estas aranĝataj tre bone gvidataj kursoj por esperantemaj homoj, ĝi ankaŭ ebligas al ili la pruvon de la ellernitaj konoj per ekzamenoj, kies plej alta grado havigas al la sukcesinto la ateston pri instruado kaj donas al li la rajton instrui Esperanton.

La atesto havas ŝtatan valoron. Multe da instruistoj, anoj de nia asocio, sukcesis en tiuj ekzamenoj kaj tiam ili kuraĝas enkonduki Esperanton en la lernejojn. La ŝtato mem ĝis nun ne regulis la leĝon por popollernejoj er

tia direkto, sed ĉie kie la lernejestro aŭ la urba konsilantaro por lernejo ne malpermesas la instruadon de Esperanto al popollernejoj tion fari estas permesata kaj ne malhelpata de la registaro de Saksujo.

Tiu stato de nia afero en Saksujo, kiu montras kaj pruvas, ke nia sukceso nur dependas de la kuraĝo aŭ malkuraĝo de niaj kolegoj instigis min labori pri tutmonda statistiko pri oficiala nacia aŭ ŝtata helpo de la Esperanto-instruado en lernejoj. Por tia statistiko mi bezonas urĝe la respondojn de gekolegoj el ĉiuj landoj kie I. A. I. havas membrojn. Mi tial petas, *direktu jesan aŭ nean respondon* pri tia ŝtata oficiala helpo al mia subskribita adreso ! Helpu ĉiulandaj gekolegoj, al tia grava statistiko ! Pro sia laboro por Esperanto nia Asocio ne nur en Saksujo sed eĉ en Germanujo kaj aliaj landoj bonvole estas rigardata kaj ŝatata. Multnombraj demandoj de diversaj gekolegoj pruvas tion. En kelkaj partoj de Germanujo oni jam komencis fondi similajn Asociojn, kiujn kunligi al Tutgermana Esperanto-Asocio de Instruistoj estos mia estonta celo. Mia kredo estas, ke estas necese krei tiajn Asociojn de Instruistoj en ĉiuj landoj, almenaŭ en Europo, kaj kunligi ilin al Tutmonda Ligo de Instruistoj. Tio estus la plej bona por ni. Kaj tia ligo estus la vera I. A. I. Eble iam mia sonĝo efektivigos.

Komunikis Max Sykora.

Dresden- N.- Martin- Luther- Str.- 6, / 11

Saksujo — Germanujo

daŭrigota.

Membroj kiuj aliĝis antaŭ la 1a de Aŭgusto 1913

- 135 F-ino J. Černa, Pardubice, Bohemujo, Aŭstrio 1.—
136 S-ro N. D. Ševčugov, s. Karatuz, Enis gub.,
Rusujo 1.—
137 S-ino Monnot, 36, rue Paul Cavaré, Rosny-sous-Bois,
Francujo 1.—
138 S-ro E. Dohnal, Vys Chlumeč, Bohemujo, Aŭstrio 1.—

- 139 F-ino Józefa Pickarczyk, Bucze-Mokrzyck, Brzesko, Galicio-Aŭstrio 1.—
140 S-ro A. Henraut, Lodelinsart, Belgujo 1.—
141 S-ro T. Vizner, Malà Ĉerna n/O, Bohemujo, Aŭstrio 1.—
142 S-ino Marija Riĵikova, Olginskaja, 19, Stavropol, Kaŭkazo, Rusujo. 1.—
143 S-ro M. Kostin, Sungariska 5, 260, Ĥarbin, Manĝurujo, Ĥinujo. 1.—
-

Estimata Samideanarol

Ni intencas ree eldonadi *Tutmondan Adresaron Esperantistan* kaj senpage dissendadi ĝin al ĉiuj enskribiĝontoj. Ni enskribos plenan nomon de esperantisto, lian aĝon, profesion kaj adreson. Estas dezirindaj, sed nedevigaj, ankaŭ respondoj je la demandoj: kiam Vi esperantistiĝis kaj ĉu Vi apartenas al la esperantista grupo, societo aŭ klubo. Se iu interŝanĝas ion, notu ĉi-tion. La sciigojn sendu al ni en fermita letero, aldonante la internacian respondkuponon aŭ 10-kopekan rusan poŝtmarkon. Por tiu respondkuponon ni enpresos Vian nomon kaj transsendos al Vi tuj post apero volumeton, enhavantan Vian adreson. Ĉiu volumeto enhavos po 1000 adresoj.

Samideaninoj & Samideanoj! Pripensu la gravecon de la tutmonda enketo kaj tuj sendu al ni la necesajn informojn.

Altestime

C. POLAK, delegito de U. E. A.

G. JAVORSKIJ, sekretario de Kiev. Esper. Societo.

Sendajojn oni adresu al Georgo Javorskij, Annenkovskaja 28, Kiew (Rusl).

Ĉiuj esperantaj societoj estas petataj konigi ĉi-tiun alvokon al la membraro!

Atentu! Gravege!

Por ne malhelpi la regulan funkciadon de nia asocio kaj la regulan aperadon de la revuo, la malnovaj membroj estas *insiste* petataj *senprokraste* sendi sian kotizaĵon.

LA KASISTO.

Skribdesegnoj de Soennecken


Por maldikaj linioj



Skribdesegnaj plumoj de Soennecken
12 dekduoj : 0,900 Sm.



Kulerplumoj de Soennecken
po peco : 0,080 Sm.



Skribtubetoj de Soennecken el metalo en 7 strekdikoj
D. R. G. M.

Krom tio : Skribtubetoj el ligno, korkoligno. plumoj kun rezervujo, plumingoj

Por dikaj linioj



Plumoj por rondaskribo de Soennecken : 12 dekduoj : 1,500 Sm.

Krom tio : plumingoj el ligno, korkoligno, metalo aŭ malmoligita
kaŭĉuko, skribiloj kun tolkovrilo, k. t. p.

—o— *Oni petu la prezaron pri skribdesegnilaj* —o—

F. Soennecken, rue du Pont Neuf, 66-68, Bruxelles-Belglando

LUEBLA

LUEBLA

BELGA ESPERANTISTO

Oficiala monata organo de
Belga Ligo Esperantista.
24 p. Esperante,
Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)
Adm. : 20, Vondelstraat.
— Antwerpen —

— THE BRITISH ESPERANTIST —

Oficiala monata organo
de Brita Esperantisto Asocio
20 p., Esperante & angle
Jara abono : 3 ŝiling (1.500 Sm.)
Sin turni al la sekr. de B. E. A.
133-136 High Holborn. London.

— LA ONDO DE ESPERANTO —

Monata gazeto kun
senpaga literatura aldono.
20 p. Esperante & ruse
Jara abono : 2 rubl. (2.120 Sm.)
Adm. : « Librejo Esperanto »,
Lubjanskij proezd, 3, Moskvo,
Rusujo.

= GERMANA ESPERANTISTO —

Duonmonata gazeto
Propaganda kaj literaturo
16 p., Esperante & germane.
Jara abono : 4.50 M. (2.250 Sm.)
Eldonejo : Ader & Borel
Dresden — A. I. Struvestr., 40

AMERIKA ESPERANTISTO

Oficiala monata organo de
Esperantista Asocio de N.-A.
16 p., Esperante & Angle.
Jara abono : 2,500 Sm.
Adm. : 607, Fifteenthstr., N.W.
Washington, D. C.

LA LANGUE INTERNATIONALE

Monata revuo
12 p., Esperante & france
Jara abono : 1.40 fr. (0.500 Sm.)
Adm.
39, Grande-Rue, Louhans.

— GERMAN-AŬSTRIA ESPERANTISTO —

Monata gazeto
8 p.; Esperante & germane
Jara abono : 3 K. (1,250 Sm.)
Adm. : VI, Dürergasse, :9,
— Wien —

SHERLOCK HOLMES EN
SERVO
DE LA HISPANA TRONO
(La unua esperanta satiro)
Deveno kaj Historio de Esperanto
(Paroladoj de Dr Zamenhof)
Ĉiu : 75 hel. (0,300 Sm.)
Ĉe : Ĉasopis Ĉeskych
Esperantistu.
Praha II, Dittrichova ul. 7.
— Bohemujo —

— DANUBO —

Monata organo de la rumanaĵ
kaj bulgaraĵ Esperantistoj
32 p., nur en Esperanto
Jara abono : 3.50 fr. (1,400 Sm.)
Adm. 14, str., Belvedere.
Bucuresti, Rumanujo.

LINGVO INTERNACIA

Centra organo de la
Esperantistoj
La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895, aperas post la 15a de ĉiu monato.
Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)

JUNA
ESPERANTISTO

Monata gazeto por junuloj,
instruistoj kaj
Esperanto - lernantoj
Jara abono : 3 fr. (1,100 Sm.)
Ambaŭ gazetoj kune : 7 fr.
Adm. : 33, rue Lacépède
— Paris —

POLA
ESPERANTISTO

Monata gazeto kun
senpaga literatura aldonado
Oficiala organo de la 8a
20 p., Esperante & pole.
Jara abono : 2.50 rb. (2.650 Sm.)
Adm. : Hoza 20, Varsovio.

LA MOVADO

Franca esperantisto
Monata organo de la
francaj esperantistoj
: 6 p., Esperante & france
Jara abono 3.25 fr. (1,300 Sm.)
Adm.: 61, Boulevard St-Marcel,
— Paris —

LA HOLANDA PIONIRO

Monata oficiala organo de
Holanda Societo Esperantista
4 paĝa grandformata,
Esperante & holande
Jara abono : 1.20 fl. (1 Sm.)
Adm. Prinsestr., 48, Hago.

ITALA
ESPERANTISTO

Monata oficiala organo de
Itala Esperanto Asocio
12 p., Esperante & itale
Jara abono 3 l. (1,20 Sm.)
Adm. 13, Salita Pollaiuoli.
— Genova —

— TUTMONDA ESPERO —

Oficiala, monata organo de
la Kataluna Esperantistaro. —
16 p., Esperante & katalune
Jara abono : 3 fr. (1,200 Sm.)
Adm. : str. Tallers, 81
Barcelono. — Hispanujo.